

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (960) • 2023 •



En Norvegio 1906
Gudmund Stenersen
(1863-1934)



Mez- somero

Paĝo 70

La festeno de S:ta
Johano, de Jules
Breton (1875)

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dek helpoj — pri la Dekalogo	51
Gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj	56
“... ni ĉiuj estas kunvokitaj”	63
Tagordo por la jarkunveno de KELI 2023	65
Financaj raportoj de KELI 2022	66
Somermeza nokto	70
Pensoj pri la Esenco	71
Kanto: Al Di!, gefratoj	72

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, mi sentas, ke mi ofte ĉi teksteton. Mi ofte levas problemojn ĉirkaŭ ni. Verŝajne la ĉiutagaj gazetaraj kaj televiziaj novaĵoj tro multe influas min. Sed antaŭ kelkaj tagoj mi legis artikoleon, kie la verkisto opinias, ke ni devas iom forlasi la problemojn kaj vidi antaŭen — kion ni celas, kion ni esperas — sed samtempe ĝui la malgrandajojn, kiuj abunde ĉirkaŭas nin. Iu iam diris, ke “kiu ĝojas pri malmulto, tiu havas multon por ĝoji”. Jes ni havas multon ĉirkaŭ ni, pri kiuj ni povas ĝojiĝi. Ĝus nun ni planas la someron, kiu por ni nordanoj alportas varmon kaj lumon kaj florojn kaj fruktojn ktp. Eble mi povos ion rakonti en iu aŭtuna numero de nia gazeto.

Ĉu vi ion planas por fari dum la somero? Rakontu mallonge, sendu foton por publikigo en nia gazeto. Rilate al Esperanto aŭ KELI aŭ ne, ne gravas. Certe la legantoj ĝojos pro via rakonto.

Bonan legadon kaj bonan someron!

Dek helpoj — pri la Dekalogo

Kvina ordono — respektu vian patron kaj vian patrinnon

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Se via filo vin demandos morgaŭ: Kion signifas la atestoj kaj leĝoj kaj reguloj, kiujn la Eternulo, nia Dio, ordonis al vi? Tiam diru al via filo: Ni estis sklavoj al Faraono en Egiptujo, sed la Eternulo elkondukis nin el Egiptujo per forta mano; kaj la Eternulo aperigis signojn kaj miraklojn grandajn kaj suferigajn en Egiptujo, sur Faraono kaj sur lia tuta domo, antaŭ niaj okuloj; kaj nin Li elkondukis el tie, por venigi nin kaj doni al ni la landon, pri kiu Li ĵuris al niaj patroj. Kaj la Eternulo ordonis al ni plenumi ĉiujn ĉi tiujn leĝojn, timi la Eternulon, nian Dion, por ke estu al ni bone ĉiam, por konservi al ni la vivon, kiel en la nuna tago. Kaj tio estos nia justeco, se ni observos plenumi ĉi tiun tutan ordonon antaŭ la Eternulo, nia Dio, kiel Li ordonis al ni.
(Readmono, 5a libro de Moseo, 6,20–25)

Respektu vian patron kaj vian patrinnon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiu la Eternulo, via Dio, donas al vi. (Eliro, 2a libro de Moseo, 20,12)

La tradicia religia pensado interpretas ĉi tiun ordonon, ke ĉi tie Dio estas je la flanko de la gepatroj, kaj volas certigi la aŭtoritaton de la gepatroj super ribelemaj infanoj. Ĉi tiel ni lernis en nia infanaĝo kaj ĉi tio estas la kutima pensado. Mi ŝatus, ke ni adiaŭu ĉi tiun interpreton el nia tuta vivo, kaj fine ni ekiru la vojon malkovri kaj akcepti la veron de la Vorto de Dio.

Antaŭ ĉio ni devas klarigi la demandon: kiu estas la “vi”, al kiu Dio alparolas en la Dek Ordonoj? Ĉar Dio ĉiam parolas al iu. Kiu estas la “vi” al kiu Dio ordonas en ĉiuj dek ordonoj? La Dekalagon Dio ne diris nur en la aeron,

ĝi ne estis donita al la homaro ĝenerale. Ĉi tiu Vorto estis donita al la popolo de la interligo, en la soleneco de interligo. Per la mediacio de Moseo, Dio faris interligon kun la popolo de Izraelo ĉe la monto Sinajo kaj donis la Vorton kiel konkretan interligon.

La judan popolon, kiu kampadis ĉe la piedo de la monto Sinajo, ni povas dividi en tri grupojn. Ni devas meti mezen tiujn homojn, kiuj aktive partoprenas en la vivo. Ili batalas kiam ili devas batali, ili laboras kiam ili devas labori, starigas la tendon, kaj malkonstruas ĝin. Tiuj estas la aktiva laborparto de la homoj. Poste estas en la tendaro la etuloj, kiuj ankoraŭ ne

laboras: la infanoj. Kaj estas en la tendaro maljunuloj, kiuj jam ne plu laboras.

Nun, kiam Dio parolas al la homoj, al kiu el la tri grupoj Li parolas? Ne estas malfacile decidi, ke Dio faras interligon kun la laboristoj, la militistoj, la subtenaj elementoj de la popolo. Ĉi tio nature disvastiĝas ankaŭ al infanoj kaj maljunuloj, sed la alianco mem validas por plenkreskuloj. Ni legis la kvaran ordonon: “*Ne faru laboron en la sabato, nek via filo, nek via filino, nek via sklavoj, nek via sklavino...*” Dio parolas al tiuj viroj, kiuj jam havas filojn kaj filinojn. “*Se via filo demandos vin...*”

Dio ĉefe alparolas al la aktiva parto de sia popolo. Se via filo demandas kiaj aferoj ĉi tiuj estas, tiam klarigu, ke Dio faris interligon kun vi. “*Kaj ripetadu ilin al viaj infanoj, kaj parolu pri ili, kiam vi sidas en via domo kaj kiam vi iras sur vojo kaj kiam vi kuŝiĝas kaj kiam vi leviĝas*” (Readmono 6,7)

Ĉi tiu simpla fakto estas klara el la teksto, sed tiam ĉi tiu ordono estas adresita ne al infanoj, sed al patroj kaj patrinoj kaj direktas al la avoj, avinoj. Do mi petas ĉiujn adiaŭi la interpreton, laŭ kiu Dio parolas al la infanoj ĉi tie. Ne tio estas la vero! Ĉi tie Dio parolas al patroj kaj patrinoj: “*Respektu vian patron kaj vian patrinojn*”. Li ne diras al infanoj respekti plenkreskulojn, sed li diras al plenkreskuloj respekti maljunulojn. Tion oni devas klarigi, por ke ni bone komprenu ĉi tiun Vorton en ĝia originala, biblia kunteksto.

Se ni volas kapti la plenan enhavon de ĉi tiu ordono, se ni volas kompreni la tutan Dian penson, tiam ni devas rimarki

alian, same gravan Vorton, veron, kiun Dio jam malkaŝis en la unuaj paĝoj de la Biblio, kiam li parolis pri geedzeco. En ĝi ni trovas ĉi tiun frazon: “*Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinojn, kaj aliĝos al sia edzino...*” (Genezo 2,24).

La viro forlasas sian patron kaj patrinojn kaj honoras sian patron kaj patrinojn. Mi konektos ĉi tiujn du. Ĉi tio ne estas proprajuĝa kunigo, nur ni kutime forgesas, ke ĉi tiuj du rilatas. Do, la ideo de Dio estas, ke kiam iu komencas novan familion, unuflanke li forlasas sian patron kaj patrinojn, aliflanke li reregardas ilin kaj respektas ilin. La plena vereco de ĉi tiu ordono, la kvina, estas dirita en ĉi tiu dialektiko.

Ne estas bone, se oni ne povas forlasi sian patron kaj patrinojn. Li tiel multe ‘respektas’ ilin, ke, kiel diras psikologoj, li restas sur la umbilika ŝnuro. Ekzistas homoj, kiuj ne povas forŝiri sin de ĝi. Tio estas same malbona kiel la malo, kiam oni forlasas sian patron kaj patrinojn sen eĉ respekti ilin. Nemezurebla kvanto da familiaj komplikadoj kaj suferoj venas de ambaŭ. Se iu ne povas forlasi sian patron kaj patrinojn, kaj tiel ‘respektas’ ilin, ke li restas bebeto apud la patrino, kiu ĉiam pretas ordoni, tio estas same malbona, kiel se iu forlasas sian patron kaj patrinojn kun malmola, malĝentila ribelo eĉ ne respektante ilin. Ambaŭ estas facilaj agadoj. Estas pli malfacile obei la ordonon de Dio. Per aliaj vortoj tiu estas la ordono de Dio laŭ la atesto de ĉi tiu Vorto: la nova familio formas sian vivon en sia propra libereco kaj homeco, kaj en ĉi tiu propra vivorondo ili respektas tiujn, kiujn ili forlasis.

Por pli bone kompreni la veron de tio, mi ŝatus ankaŭ prilumigi ĝin el kontraŭa pensosistemo. Ĉar ĉi tiu estas unu penso, sed ekzistas aliaj religioj, aliaj pensoj. Mi citas la ĉinan religiecon, la religion de Konfuceo, en kiu ege gravas honori la gepatrojn. Historiistoj de religio precize montris, ke la unua dogmo de antikva ĉina moralo estas, ke la gepatroj ĉiam pravas. Gepatroj havas rajtojn, eĉ punrajton al la infano, kiu ribelas, kiu malobeas la gepatrojn.

Jen rakonto, el kiu vi povas bone kompreni la tutan pensmanieron.

Ĉina patro estis tre malriĉa. Li vivis kun sia patro kaj infano en ekstrema malriĉeco kaj malsato. La problemo estis ĉu doni la malmulton, kiun li havis, al sia patro aŭ al sia infano. Kaj laŭ la rakonto, la ĉina patro enterigas sian vivantan infanon por ke li povu nutri sian patron. Entombigante sian infanon, fosante la kavon li trovas keston plena de trezoroj. La instruo de la rakonto estas, ke dioj akceptas lian oferon kaj benas tiun, kiu plenumas la leĝon. La patro ne havas devon al sia infano, sed al la gepatroj. Ĉi tio estas la baza ideo de ĉina moralo. Tio eĉ pli validas, la gepatroj libere disponas je sia infano, ekzemple li povas vendi aŭ mortigi lin sen iri al tribunalo. Sed estas mem la katastrofo, se la infano levas manon kontraŭ siaj gepatroj.

Mi legis, ke okazis en 1882, ke ĉina junulo iris hejmen ebrie. Lia patrino riproĉis lin ĉar li estis ebria, kaj la knabo batis sian patrinon. La patrino ekkriis, kolektis la virojn, kiuj ŝnurigis la knabon kaj enterigis lin vivante. Kaj la vilaĝo akceptis tiun punon kiel reprezenton de

la ekzistanta ordo. Do la patrino povas enterigi sian infanon vivante, ĉar li levis la manon sur ŝin. La scienca nomo de ĉi tiu sistemo estas patriarkeco. Ĉiuj rajtoj apartenas al gepatroj kaj infanoj devas obei.

Kontraŭ ĉi tiu sistemo mi montras la biblian penson, kiu diras: “*Respektu vian patron kaj patrinon*” kaj “*Forlasu vian patron kaj patrinon, kaj aliĝu al via edzino*”.

Mi ŝatus montri kiel la fondado de familio okazas ene de la rondo de la patriarka penso, kaj kiel ĝi okazas en la rondo de la Biblio. En patriarkeco, la familio estas granda rondo. Fondi novan familion signifas, ke unu el la individuoj en la granda rondo geedziĝas kaj iu eniras la rondon. Patro kaj patrino daŭre regas. La cirklo ne rompiĝas, ĝi nur pligrandiĝas. Ĉi tio estas la ĉina patriarka sistemo. Kontraste, la ideo de la Biblio estas jena: la rondo estis donita, inkluzive de la familianoj. Geedziĝo okazas, iu forlasas la cirklon kaj kreas novan rondon ekster la cirklo, kaj la nova cirklo retro-rigardas la antikvan cirklon kun respekto. Jen la grandega diferenco inter la du ideoj. Kaj mi deklaras al vi, ke tio estas la penso de Dio.

Se ni rigardas judismon pli precize, ni devas vidi, ke ĝi estis influita de patriarkaj ideoj. Sed Dio deklaris, validigis sian ideon, ke li ne portas la patriarkan ideon, sed ĉi tiun dialektikan ideon. Ĉi tio povas ofendi la tradician pensmanieron de iuj homoj. Mi rigardas ĉi tiun malĝojon kun respekto, sed mi konfesas kun plena konvinko, ke mi diras la veron de la Vorto.

Post tio necesas klarigi, kion signifas la vorto ‘respekto’. Kion ni faru, kiam ni volas respekti nian patron kaj patrinojn? Ĉi tie denove mi laboras kun la metodo montri la ekstrecojn, inter kiuj ‘respekto’ troviĝas ie. Unu ekstremo estas egoisma ribelo kontraŭ gepatroj, la alia estas blinda obeo al gepatroj. “*Respektu vian patron kaj vian patrinojn*” evidente ne povas signifi ribelon nur por la ribeleco mem, sed ĝi ankaŭ ne povas signifi senpripensan obeemon. Mi kredas, ke “*Respektu vian patron kaj vian patrinojn*” estas lerta dialektiko de la du ekstrecoj. Saĝe kontraŭi gepatrojn kaj saĝe obei ilin. En ĉi tiu unueco, unuflanke mi ribelas, kio signifas, ke mi diras kun respekto kaj amo: “Mi elkreskis el ĉi tiu rondo, mi interpretas mian vivon alie”. Aliflanke mi obeas saĝe: “Mi cedas al vi, nun jam ne pro tio, ĉar vi estas mia patro kaj patrino kaj vi havas aŭtoritaton super mi, sed ĉar nun jam ankaŭ mi ekkomprenis, tion, kion vi jam ekkomprenis, kaj mi obeas tion, kion vi obeas.”

Kia estis la familia situacio en la pasinteco? “Silentu infano, mi estas via patro, mi ordonas al vi! Kiel vi kuraĝas esti impertinenta kun mi?” Alivorte, ĝi estis absoluta diktaturo de la gepatroj. Kaj hodiaŭ estas absoluta diktaturo de la infanoj. “Kiel do vi kuraĝas opinii pri mia vivo?” – demandas la infano.

Mi pensas, ke vi bone sentas, ke ambaŭ estas malbonaj. Pasis la tagoj, kiam la gepatroj regis la infanon. Ni ne imagu, ke tio estis la kristana mondo, kaj la hodiaŭa estas la pagana mondo! La antaŭa estis same pagana kiel la nuna. Kion Dio diras en ĉi tiu ordono signifas, ke Dio ne staras

en la flanko de iu. Li volas instrui kaj gepatrojn kaj infanojn bone vivi. Dio diras: “*Respektu vian patron kaj vian patrinojn*”, kaj tio signifas, ke vi havas la rajton formi vian propran vivon, eĉ, tio estas via homa tasko. Dume vi memoru kun respekto tiujn, kiuj ankaŭ formis sian vivon, oferis por vi kaj volis transdoni al vi sian heredaĵon. Vi rajtas ekzameni ĉu ili transdonas bonan ideon aŭ bonan veron, sed vi devas agi kun respekto.

Jen la demando pri aŭtoritato. Estas multaj plendoj, ke infanoj ne respektas la aŭtoritatecon de siaj gepatroj. Vi devas rigardi: ĉu la gepatroj mem havas aŭtoritaton? Nur pro tio ke la patrino naskis sian infanon, ĉu ŝi jam havas aŭtoritaton? Ĉi tio ne estas vera. La gepatra stato aŭtomate ne estas aŭtoritato. Hodiaŭ 13-jara infano diras: “Kial vi naskis? Ĉu mi volis naskiĝi?” Nur pro tio, ke vi naskis infanon, vi ne povas postuli aŭtoritaton al vi mem. Ĉi tio estas la ordo de Dio: se la gepatroj kliniĝas antaŭ pli alta aŭtoritato, kaj la infano vidas tion, tiam ankaŭ la gepatroj havos aŭtoritaton antaŭ la infano. En sana kazo — kaj mi konsideras tion kristana kazo — la gepatroj diras: “Mia infano, mi serĉas la veron, mi serĉas kio estas bona, kaj en la procezo mi alvenis al la konkludo, ke estas bone ami Dion, estas bone ne damaĝi homojn, estas bone pardondoni. Mi mem ne povas teni ĉiun ordonon, klopodas, sed ne povas, sed mi ŝatus transdoni mian sperton al vi, por ke ankaŭ vi faru la samon.” Se tiel parolas la gepatroj, tiam li havos aŭtoritaton. Prefere ne al la gepatroj, sed al la vero, kiun li serĉis kaj serĉas. Ne estas la gepatraj statusoj, kiu

havas aŭtoritaton — Dio havas ĝin. Se Dio ne havas aŭtoritaton super gepatroj, estu preta, ke la gepatroj ankaŭ ne havos aŭtoritaton super sia infano. Tiu, kiu diras al sia infano: “Vi mizera infano, vi ĉiam mensogas, sed mi neniam mensogis!” — ne miru, se li ne havas aŭtoritaton. La infano klare vidas la mensogojn. Ni ne povas postuli aŭtoritaton surbaze, nur pro tio, ĉar ni naskis infanon! Aŭtoritato devus esti gajnita, ne postulata. Kiel mi batalas por la vero, mi pentas, mi ne sukcesas. “Infano mia, mi deziras, ke vi faru pli bone!”

Jen kiel Dio mistere ellaboras la aŭtoritaton de la gepatroj.

Ni ricevas Dian helpon en ĉi tiu ordono por fariĝi homo. Resumante la pensojn ankoraŭ unu fojon, mi formulis la veron de la kvina ordono tiel:

Kiu ne povas konstrui sian propran vivon, ankoraŭ ne fariĝis vera homo. Sed ankaŭ tiu ne fariĝis al homo tiu, kiu piedbatas ĉion, turnas la dorson al ĉio kaj diras per laŭta radikalismo: mi alimaniere faros!

La ordo de Dio estas kontinueco, mia vivo estas konstruita sur la pekoj kaj pardonoj de antaŭaj generacioj. Tiu fariĝas homo, kiu kun respekto spektas la faliĝon, la voj-perdon kaj serĉadon de la antaŭaj generacioj kaj dumtempe konstruas sian propran vivon. Kiu ne povas foriri de la antaŭa generacio, ne fariĝas homo, kaj ne fariĝas homo tiu, kiu

radikale renversas ĉiujn antaŭajn sistemojn kaj ideojn. Tio estas sufiĉe laŭmoda nuntempe. Radikala individualismo estas kiel movebla sablo, kiu vere ne estas alkoĉita al io ajn, kaj estas portata tien kaj tien per ajna ventoblovo. Tia absolute radikala homo ankoraŭ ne fariĝis homo. “*Respektu vian patron kaj vian patrinon*” signifas, ke vi rajtas konstrui pli bonan mondon ol tiu, kiun via patro kaj patrino konstruis, vi rajtas formi pli altan, pli puran homan vivon ol kiun vivis via patro kaj via patrino. Dume vi lernos aprezi, kion via patro kaj patrino luktis dum konstruado de sia mondo. Vi estas libera eduki vian propran infanon pli bone ol via patro kaj patrino edukis vin. En la malsukceso de via edukado vi lernos aprezi la laboron de via patro kaj patrino, per kiuj ili edukis vin.

Ĉi tio estas kontinueco, la serĉado de la pli bono, kaj dum viaj faliĝoj vi lernas respekti viajn gepatrojn, kaj vi ekkomprenos, ke ankaŭ super via bonvolo estas la ombro de faliĝoj.

Nur tiuj, kiuj kreis nenion novan aŭ pli bonan, malrespektas la antaŭulojn. Tiu, kiu spertas, ke ne sukcesas, kion li bonvolis, kiu volas kreskigi sian infanon pli bone ol sia patrino edukis lin, komencas profunde respekti kaj ami sian patron kaj patrinon.

Tio estas la Dia signifo de tiu ĉi ordono.



Gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj

Enkonduko al Antologio Latina

Gerrit BERVELING, NL

(Daŭrigo de Dia Regno numero 2/2023)

Maniĥeismo¹⁵

Maniĥeismo ne estas nur kristana movado, sed havas tamen multajn rilatojn kun kristanaj movadoj. Ĝi estas religio, fondita de la profeto Mani (ĉ. 215–275), kiu devenis el juda-kristana baptista sekto en Persio. Surbaze de siaj vizioj li predikis religion de interkompreniĝo kaj toleremo, kiun kutime oni nomas *sinkretisma*. En siaj leteroj li ĉiam nomas sin “apostolo de Kristo”. Post vojaĝoj al Hindio kaj – laŭdire – eĉ ĝis en Ĉinio, li revenis al la kortego de la persa reĝo. Li mortis krucumite sub nova reĝo, viktimo de l’ malamo de la pastroj de Zaratuŝtro. Postrestas de li pluraj sanktaj skriboj.

Aŭgustino dum siaj junaj jaroj relative longe estis aktiva “aŭskultanto” (unua-grada inicito) en tiu religia movado. En la 20a jc dank’ al trovaĵoj en Turfan (Turkestan, Ĉinio), Medinet Madi (Egiptio) k.a., oni malkovris multajn originalajn tekstojn de Maniĥeismo, kiun ĝis tiam oni nur svage konis dank’ al citoj ĉe ĝiaj kontraŭuloj.

Maniĥeismo multrilate similas je gnostiko. Tamen ĝi havas specifajn trajtojn, kiuj faras ĝin pli universala religio. La “mitologio” de l’ Maniĥeismo rakontas pri emaniĝoj el la plej supera Dio. Krome ekzistas iu eterna Kontraŭ-

Dio, la Mastro de l’ Mallumo. Tiu forto de l’ mallumo atakis kaj parte forkaperis spiritajn estaĵojn el la regno de l’ lumo. Per tio, komence de l’ historio de la universo, komenciĝis longa batalado. La supera Dio (estro de la lumo) sendis la prahomon, kaj sendis la vivantan Spiriton por subteni lin. Celo estis konsciigi ĉiujn lum-elementojn kaptitajn en la — malbona — materia mondo (la animojn) kaj savi ilin retro al la regno de l’ lumo. Jesuo estis sendita de Dio por diskonigi tiun *scion*. Pluraj animoj, kiuj iel jam estis savitaj, tamen pro amo al la cetera mondo rifuzas jam enlumiĝi, sed unue volas ankoraŭ labori en nia mondo por savi pli da animoj el la mallumo¹⁶. Mani estis la lasta en la serio da profetoj, senditaj de Dio por helpi al la homaro retrovi sian originan destinon: Zaratuŝtro, Budho, Jesuo... Li estas la *Parakleto*. La maniĥeaj komunumoj konsistis el du gradoj: la aŭskultantoj kaj la elektitoj. La dua grado estis pli intime inicita en la misteroj de l’ *scio* kaj vivis askete, sen seksaj rilatoj, vegetare kaj senalkohole. La aŭskultantoj estis devigitaj obei certajn moralajn regulojn kaj subteni la elektitojn. Ĉefo de la komunumo (eklezio) estis iaspeca papo aŭ imamo, unue en Babilono, poste en Samarkand. Loke — regione — ili konis episkopojn kaj presbiterojn. La diservo grandparte konsistis en preĝado kaj fastado; ĝi ne konis

statuojn aŭ oferojn de bestoj, ĉar mortigo estis severe malpermesita.

Maniĥeismo rapide disvastiĝis orienten ĝis en Ĉinio (kie oni retrovis en la 20a jc plurajn sanktajn tekstojn) kaj okcidente ĝis en Sud-Francio kaj Hispanio; ĝia influo je Kristanismo kaj Islamo estis grandega.

persekutado religia

a] pri (ortodokse) kristanaj martiroj
La Romia socio kutime ne tiom okupiĝis pri ĉies *persona* konvinkiĝo: ĉu fidi je Dio aŭ Dioj, kio gravas? Gravis nur la *socia* dimensio: se iu estis elektita en loka urbeŝtaro (eĉ en vilaĝo), ĉe la enoficiĝo oni estis devigita fari oferojn al la Dioj, por peti ties benon por la oficperiodo. Se iu havis konscienciproĉojn, kiel okazis ĉe kristanoj en tiu situacio, li ne povis esti bona civitano. Do kristanoj pli malpli aŭtomate ekagadis kvazaŭ eksteruloj de la socia vivo. — Same kompreneble jam de generacioj estis la situacio koncerne judojn: pro la *Toraaj* reguloj, la plimulto de la religiaj judoj ne vidis eblecon manĝi komune kun siaj najbaroj, eĉ ne ĉe simplaj kvartalaj festoj, kiam oni manĝis ekstere sur benkoj.

Do rezultis certa *fremdeco*. Kaj el fremdeco relative facile estiĝas mal-amikeco, klaĉoj en la najbaraĵo, k.s. — multaj “religiaj persekutadoj” ofte estas, ĉe pli deapuda pristudado, kvartalaj kvereloj inter najbaroj. La lokaj aŭtoritataj sentis sin devigitaj por fari kvieton, interveni kaj puni la kulpulojn — kio ofte estas la malplimulto, kiel pli facile kaptebla. Eble al tio atribueblas pluraj

persekutoj, kiujn aludas tekstoj en Nova Testamento: judoj kaj “nov-judoj” (= kristanoj) interkverelis kaj per tio perturbis la kvieton socian...

Kelkfoje, tamen, okazis certa persekutado instigita de la registaro: ekzemple, unuafoje kiom ni scias en la historio de Romo, tio okazis dum Nerono (54–68). Kiam okaze de la fifama brulo de Romo, kiu kreis spacon por ampleksaj imperiestraj ĝardenoj kaj poste eĉ la Koloseo, la popolo en la brulantaj kvartaloj malriĉulaj ekprotestis, kulpigante pri la brulo la imperiestron (oni eĉ asertis ke laŭ lia ordono soldatoj forpuŝis sitelojn kun akvo el la brakoj de la homoj, kiuj kontraŭbatalis la fajregon), jam baldaŭ la protesto tiom akriĝis, ke Nerono sin sentis minacata. Li kulpigis tiam la *kristanojn*. Supozeble pri kristanismo li sciis nenion aŭ preskaŭ nenion.

Kiel ajn — ĉiu, kiu havis problemon kun iu ajn najbaro povis senprobleme kulpigi tiun pri kristanismo: la policistoj arestis, pridemandis (ne senperforte) por eligi konfesojn, kaj multajn oni kondamnis. Nerono fariĝis fifama kiel la unua persekutanto de Kristanismo¹⁷.

Kio rezultis el tiu incidento? — Leĝo imperiestra de Nerono, ke “ne rajtas esti kristanoj”¹⁸.

Poste estis relative kviete en la vasta Imperio ĝis Domiciano (81–96), kiu postulis esti adorata kiel “Sinjoro kaj Dio”. Dum lia regado verkis la profeto Johano sian *Apokalipso*: konata el nia *Nova Testamento*.

En 250 p.Kr. imperiestro Decio entreprenis provon fine komplete ekstermi Kristanismon, devigante oficistojn-

policistojn iri laŭ la pordoj de la homoj por peti, ke oni plenumu oferadoceremonion al la tradiciaj Romiaj Dioj. Kiu tion faris, ricevis ateston; kiu ne, riskis la morton. Dum ĉi persekutado mortis pluraj kristanoj, sed minimume same multaj — eble pli — apostatiĝis, kio post la morto de Decio liveris grandan problemon al teologoj.

Konserviĝis pluraj tiaj atestaĵoj pri oferinteco al la tradiciaj Dioj. Ekzemple en papirusaj fragmentoj el Egiptio.

En 303 Diokleciano komencis lastan ĝeneralan ekstermo-provon pri Kristanismo. Por postaj generacioj ofte li estas kvazaŭ ekzemplo: Ĥrotsvitha de Gandersheim (ĉ. 935–ĉ. 1002), monaĥino Germana, verkis plurajn teatraĵojn, i.a. *Dulcicio* pri la persekutado tempe de Diokleciano.

La venko de Konstantino kaj lia edikto pri tolerado el 313 finis la periodon de persekutado. Sed post tiam Kristanismo foje fariĝis de persekutata en persekutantan potencon.

Restas al ni sufiĉe multe da t.n. *Martiratestaĵoj* aŭ *Martiraktoj*. Post martiriga proceso la surlokaj kristanoj kolektis la protokolojn, foje iom ornamis aŭ prikomentis tiujn per propraj reagoj k.s., kaj uzadis ilin, ekzemple okaze de diservoj por ĉiujara memorado pri la morto de la koncerna martiro. Ĉar pri martire mortintaj kred-atestantoj¹⁹ oni nepre kredis, ke ili *rekte* iris al Dio en la ĉielo, laŭ la diro de Jesuo al la t.n. “kredanta murdisto”, kiu kun li estis krucumita: *Laŭ Luko 23:43*.

En la nuna libro oni povas legi ankaŭ la *Martirakto de Skilio* kaj la plej faman:

Pasiono pri Perpetua kaj Feliĉita. Ĉi-volume sekvos pliaj por ankaŭ iom montri diversajn tipojn.

b] pri Donatistaj martiroj

La Donatistoj estas kristana movado, kiu estiĝis ĉirkaŭ episkopo Donato de Kartago (313–355), kiu estis elektita episkopo de parto de la loka eklezio anstataŭ alia episkopo, kiu laŭ ili ne estis sufiĉe severa. Efektive do temis pri loka skismo. La jaro 313 (la jaro de la edikto pri tolerado de Konstantino: fino pri persekutadoj kontraŭ kristanismo) por la eklezia historio gravegas. Sed tiu edikto ne finis ĉiujn problemojn: la diskutoj, kion fari pri kristanoj, kiuj cedis antaŭ persekutado kaj portempe malkonfesis sian religion, kiuj jam ege akre dividis la spiritojn tempe de Cipriano, ankaŭ plu disŝiris la komunumojn kristanajn: la sekvantoj de Donato postulis, ke “vera” eklezio estu “perfekta”, do senmakula. Do homoj, kiuj iam malkonfesis, ne plu povis esti membroj, ktp.

La Donatisma skismo — kiun nuntempe oni probable titolus *fundamentisma* — vaste disŝiris la Afrikan eklezion: ili formis propran paralelan eklezion; en 336 Nord-Afriko havis jam 270 Donatismajn episkopojn. En koncilio de *Arles* (Suda-Francio) ili estis kondamnitaj, sed ili plu ekzistis. Imperiestro Konstantino en 321 eĉ oficiale agnoskis ilin kiel duan eklezion en Afriko, kun egalaj rajtoj. Multaj lokoj havis du episkopojn.

Kelkfoje la Donatistoj formis perfortemajn grupojn por ataki “normalajn” (katolikajn) kristanojn, kredante, ke se ili mortos tiumomente, aŭtomate ili fariĝos

martiroj — sekve venos en la ĉielon. Kiu aliĝis al ili, estis re-baptita, ĉar la normalan bapton (de “tiu ne sufiĉe radikala kristanismo”) ili ne rekonis.

Donatismo daŭris plu kiel propra paralela kristanismo. Ankaŭ tempe de Aŭgustino (fine de la 4a jc) la situacio restis tragedia. En 411 li organizis religian diskuton kun ili en Kartago: 286 Katolikaj episkopoj kontraŭ 279 Donatistoj²⁰. Denove Donatismo estis kondamnita, sed ĝi restis plu ekzisti ĝis ĉe la alveno de Islamo²¹ ĝi malaperis.

c] pri Arianaj martiroj

Arianismo estiĝis pro instruo de Ario (256–336), presbitero en Aleksandrio. Li emfazis la unuecon de Dio. Malsame ol la plimulto de Kristanismo, Arianismo konsideras Jesuon kaj sanktan Spiriton

kiel submetitajn al Dio la Patro. Fariĝis eklezi-vasta konflikto inter Unitariismo kaj Trinitariismo²²: kredo je Dio kiel Tri-unuo. En 325 la — oficiale nur pagana! — imperiestro Konstantino kunvokis la unuan ekumenan koncilion en Niceo; la akceptita kredkonfeso de Niceo parolas pri Dio la Patro kaj la Filo kiel “samsubstancj”. Tamen, Arianismo plu ekzistis, ĉar la filozofiajn terminojn ili malsame interpretis ol la ortodoksaj kristanoj.

En 251, dum imperiestroj Decio kaj Herenio Etrusko, la tiama papo de Romo sendis sep episkopojn al Gaŭlio por tie venki Arianismon. Multaj gaŭloj ja apartenis al Arianismo. Ankaŭ pluraj ĝermanaj popoloj rande la Romia Imperio aliĝis al ĝi.

Fama estas ankoraŭ la okcident-gota episkopo Vulfilo (*Wulfila*, ĉ. 310–ĉ. 382),

Gerrit Berveling en sia studĉambro. Fotis Madzy van der Kooij.



kiu faris gotan tradukon de la biblio. Vulfilo disvastigis la arianan version de kristanismo inter la gotoj.

Kelkaj imperiestroj malkaŝe subtenis Arianismon, dum aliaj persekutis ĝin. Ĉirkaŭ 400 p.Kr. en la Romia Imperio pere de akra persekutado ĝi estis pli malpli neniigita.

d] pri Judaj martiroj

Ĝenerale koncerne Judojn estis relative kviete en la vasta Imperio. Krom, kompreneble en Palestino mem. Judismo estis ne devigita kunkulti la Imperiestron en ties Dia rolo; la Romia ŝtato “realisme” akceptis ilian “fremdecon” en tio, ke judoj ja simple ne havas pli ol nur unu Dion – kaj sekve dua Dio ne estas nur eta paŝo kiel ĉe ĉiu “normala” religio... Sekve oni lasis ilin kvietaj en tio. Kondiĉe, ke ĉiujare la Ĉefpastro preĝu en la templo en Jerusalem por la sano de la imperiestro – kaj pagu iom da ekstra tributo...

Ankaŭ tre grava ĉi-teme estis la pogromo en Aleksandrio sub Klaŭdio; la tuto komenciĝis el intenco de Kaligulo en 39 p.Kr. starigi statuon pri si mem en ĉiuj temploj, ankaŭ en tiu de Jerusalem²³. En 49 ĉiuj Judoj estis ekzilitaj el Romo, ĉar ofte okazis kvereloj kaj stratbataloj inter (eks-judaj) kristanoj kaj (pli ortodoksaj) judoj. Klaŭdio forpelis ĉiujn, por gardi kvieton.

En 66 iu Floro (*Florus*) ŝtelis aferojn el la templo en Jerusalem; rezultis insurekcio kontraŭ la romia potenco, kun kulmine la neniigo de la juda templo en Jerusalem (70 p.Kr.). Ĉirkaŭ tiu tempo estis neniigitaj i.a. la setlaĵoj en la nuna *Qumran*²⁴ kie en 1947–1956 oni retrovis

en 11 grotoj amason da hebreaĵaj tekstoj kaj fragmentoj, i.a. pli malpli kompletan rulaĵon kun la teksto de *Jesaja*.

Mortis tiumilite amaso da homoj; multaj fuĝis.

En 116 Hadriano ordonis mortigi ĉiujn judojn en Mezopotamio; sekvis la “Dua Juda Insurekcio”; en 117 li i.a. malpermesis la cirkoncidon al judaj knaboj (kun pravigo, ke li deziris protekti infanojn kontraŭ korpa mutilado); sekvis pli da kontraŭ-judaj verdiktoj: malpermeso studi la Toraon, malpermeso celebri la ŝabaton. En Lido (nuna Lod) multaj Judoj pereis.

La “Tria Insurekcio” estis 132–135, sub gvidado de Simono Bar Kōhba, kiun oni honoris per la titolo *Mesio*. La romiaj armeoj reagis ege fanatike. Fine mortis inter 600 000 kaj eble miliono da judoj. Jerusalem estis neniigita kaj samloke oni konstruis greke-romian novan urbon kun la nomo Elio-Kapitolino (*Aelia Capitolina*), kun ĉeftemplo dediĉita al Jovo.

Rezultas la *diasporo*.

Persekutado de judoj fare de kristanoj eble komenciĝis en la 4a jc. Mi ne trovis tekstojn el frua tempo, kiuj tion atestas.

d] pri Maniĥeaj martiroj

Maniĥeoj en pluraj medioj estis persekutataj. Jam tuj dekomence la profeto Mani mem, kiu mortis martire: origine Mani senprobleme povis predikadi, kun aprobo de la persa reĝo Ŝapuro I (241–272), kiu estis tre tolerema en religiaj aferoj. En la Romia Imperio tamen li estis proverbe fi-fama kiel la plej grava neniiganto-malamiko, iom simile kiel siatempe Hanibalo. Imperiestro Valeriano I (253–260) estis

venkita de li kaj ĝismorte torturita; lia haŭto – preparita – pendis kiel trofeo en la palaco de Ŝapuro. Sed la kasto de la magoj (pastroj de Mitrao) post lia morto, sub reĝo Baramo I (Bahram), radikale ŝanĝis la etoson: Mani estis kaptita, torturita kaj ĉ. 276 mortis kiel martiro. La Zoroastra religio rekonkeris sian regadon super Budhismo, Judismo, Kristanismo ktp ... Depost tiam la persa regno persekutadis la maniĥeojn.

Ankaŭ en la Romia Imperio ili ofte estis persekutataj. Por doni ekzemplon koncerne Nord-Afrikon, jen cito el koncerna edikto de Diokleciano de 297²⁵:


La imperatoroj Diokleciano kaj Maksimiano Aŭgustoj kaj Konstantino kaj Maksimino plej noblaj Cezaroj, al Juliano prokonsulo de Afriko: (..) 4: (..) Ni aŭdis, ke antaŭnelonge kiel nova kaj neantaŭvidita plago en tiun mondoparton envenis la maniĥeoj, devene aŭ naskite el la persa lando, kiu malamikas al ni, kaj ke ili faras multe da malbono (..) kaj ke estas timende ke, kiel ofte okazas en tiaj aferoj, kun

la paso de l' tempo, per siaj malindaj moroj kaj la fiaj leĝoj de la persoj ili infektos ne nur la modestan kaj kvietan romian popolon, ĉi tiujn plej senkulpajn homojn, sed eĉ tiun ĉi nian universan mondon, kvazaŭ per mortiga serpento-veneno. [...] 6 Ni do ordonas, ke la aŭtoroj kaj gvidantoj kune kun siaj abomenaj skriboj submetiĝu al plej severa puno, tiel ke ili estu bruligitaj en flama fajro; la sekvantojn kaj la konsentantojn oni mortkondamnu, kaj iliajn havaĵojn oni konfisku por nia trezoro. 7 Se eventuale honoruloj aŭ personoj de certa indeco transiris al tiu ĉi misfama sekto aŭ al ĉi doktrino de persoj, iliajn havaĵojn vi konfisku por nia trezoro, kaj ilin mem vi sendu en la minejojn de Feneso aŭ Prokonseso. 8 Por ke ĝisradike neniigu ĉi tiu infekto el nia plej feliĉa epoko, via pia sindediĉo haste obeu al la la ordonoj kaj reguloj de nia bonvolemo. Donite la 31an de marto en Aleksandrio.

Do fariĝis leĝo, ke iliajn spiritajn gvidantojn (episkopojn) kaj iliajn sanktajn skribojn oni bruligu, la pli simplajn sekvantojn oni “nur” senkapigu – kaj ĉies havaĵojn por la ŝtato oni konfisku.

Precipe en la 4a jc tiu konfiskada regulo ofte kondukis al gravaj persekutoj, en kiuj volonte partoprenis ĉiuspecaj, eĉ inter si batalantaj kristanaj grupoj: la katolikaj same kiel la donatistoj.

Ankaŭ Aŭgustino, kiu mem en fruaj jaroj apartenis al la maniĥeoj, plene aprobis tiun sintenon de la registaro; li eĉ



konsideris ĝia tasko, ke ĝi senigu la landon de herezuloj.

Kiel multe da martiroj maniĥeaj efektive falis, ne estas sciate. Sed ĉu multnombre aŭ ne: tiu ĉi persekutado estis relative efika. Maniĥeismo grandparte malaperis el la Romia Imperio.

----- Klarigoj

15 La vorto venas de *maniĥaj* = *Mani vivas!* Tio estas kredkonfeso: Mani mortis martire – sed li ja *vivas!* Ankaŭ la Maniĥea etimologio, kiun donas Aŭgustino, estas sciinda: *μάννα χεῖ* = li elverŝas manaon; en sia (sola konata, do kontraŭ-Maniĥea) tempo Aŭgustino mem derivas la nomon de *μανία* = frenezo.

16 Komparu kun la koncepto de Avalokitesvara en Budhismo, kiu ankoraŭ ne akceptas la enlumiĝon (budhiĝon) antaŭ ol ĉiuj homoj surtere estos iluminiĝintaj.

17 La priskriboj en *Quo Vadis* de Sienkiewicz pri tutaj preskaŭ senfinaj vicoj da senkulpaj kristanoj murditaj historie estas ne realecaj. Eble tie parte parolis la Pola patrioto. Pli serioze traktas la temon Anna Löwenstein en sia *Morto de Artisto*.

18 Vidu en *Antologio Latina 4*, ĉe Plinio-Trajano.

19 Efektive *martiro* signifas *atestanto*, nome pri la fido.

20 Unu de la temoj estis, ĉu sakramento (bapto, ekzemple) estas valida, se faras ĝin iu pastro ne vere inda. Laŭ Donatistoj ne – laŭ Katolikoj jes, ĉar ne la pastro estas garantio pri sakramento, sed nur Dio mem. Homoj ja povas esti neperfektaj.

21 Historie la konkero de Nord-Afriko fare de Islamo estis grande faciligita de tio, ke multe da tieaj kristanoj vere laciĝis pri ĉiaj internkristanaj pridogmaj kvereloj. Islamo prezentis simpligitan teologian instruon facile akcepteblan por multaj.

22 Dum la *Reformacio* la temo, kompreneble, ree fariĝis aktuala: Michaelo Servet en Genève eĉ martire mortis pro ĝi sur brulŝtiparo – kun plena konsento de Kalvino mem.

24 Filono Aleksandria (ĉ.12 a.Kr. – ĉ.54 p.Kr.) – *Legatio ad Caium*: okazis pogromo kontraŭ Aleksandriaj Judoj; Filono estis membro de delegacio al Romo por protesti ĉe imperiestro Klaŭdio, kiu sekvis Kaligulon kiel imperiestro.

25 Fakuloj kutime supozas, ke inter ĉ.140 a.Kr. kaj 68 p.Kr. la setlaĵon okupis branĉo de la t.n. Esenoj, aŭ Kumransekte aŭ Mortmara Sekto. Laŭ pluraj estis ia monaĥejo. Aliaj tion neas.

26 Cod. Gregor. L.xiv. de maleficis et manichaeis; titulus iv.

☞

Vizitu Fontoj.net

Granda trezorejo por ni kristanoj. Tie vi trovas ekzemple Dia Regnon post 2000 aŭ la tekston de ADORU kaj aliajn gravajn kaj interesajn tekstojn.

“... ni ĉiuj estas kunvokitaj”

Prediko dum la kongreso en Domaszék, 21a de julio 2022

Philippe COUSSON, FR

Hebreoj 13,14: *Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan urbon, sed estontan ni serĉas.*

Efesanoj 2,19: *Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio,*

Karaj gefratoj, dum ĉi tiu semajno, ni multe pripensis pri kiu ĉiu el ni estas, pri kiuj ni mem estas kaj kiuj estas la aliaj.

Vi do komprenis ke mi hodiaŭ reprenos la temon tra tiuj du esencaj versikloj.

Mi tie prenos la pozicion de disĉiplo: kiel la disĉiplo situu en niaj mondo kaj ĉirkaŭo.

Antaŭ la aplika konkludo, mi volas rigardi al tiuj tekstoj kaj al iliaj vortoj, kiujn la diversaj tradukoj ne egale tradukas, eĉ lasas ion, kio povas esti preskaŭ kontraŭdiro.

Hebreoj 13:14 :

Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan urbon, sed estontan ni serĉas.


Ne multon por diri. Tamen,

”Urbo”, tio estas polis (πολις), do ankaŭ politika unuo. Politikaj unuoj ne restas, ne porĉiame daŭras. Politikaj unuoj ne estas niaj, de ni kristanoj. Nia tasko ne estas regi ilin. Tiu ĉi mondo ne

estas la nia, ni pasas. Tamen, Jeremia, parolante al la ekzilitoj diras ion gravan, kion aplikis la Judoj kiam ili estis disigitaj ĉirkaŭ la mondo : *Zorgu pri la bonstato de tiu urbo, kien Mi transloĝigis vin, kaj preĝu por ĝi al la Eternulo; ĉar ĉe ĝia bonstato vi ankaŭ havos bonstaton* (Jeremia 22:7).

Same kiel Judoj, la kristanoj devas zorgi pri la bonstato de la urboj, de la ŝtatoj kie ili vivas, preĝi por ili, sed nepre ne regi ilin, ne kompromisi kaj sekve kompromiti la mesaĝon.

Ni estas vokitaj por serĉado, elserĉado de alia urbo, alia civito, serĉado intensiva.



Tio devas esti nia ĉefa tasko, zorgo.

La vorto tradukita per “estontan” havas interesan etimologion. Ĝi estas formo de la verbo mellô (μελλω) kiu signifas : esti faronta, esti celata por, esti estonta kaj ankaŭ malfrui. La afero venos certe.

Estas en la greka certe vortludo, kiun mi ne kompetentas plene analizi. La du vortoj por *restanta* kaj *estonta* estas tre similaj, tre tre similaj en formo : *menousan* kaj *mellousan* (μενουςαν, μελλουσαν). Eble tiu simileco estas uzata por apudmeti ilin, unu kontraŭ la alia.

Efesanoj 2:19 :

Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pas-loĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio.

En ĉi tiu versiklo, estas tre interesaj vortoj por diskuti kaj komenti. Mi tiam rigardos la grekan originalon, la Esperantan tradukon kaj ankaŭ la hungaran.

Ĉi tiu teksto kontraŭmetas 4 vortojn, du kontraŭ du, kaj tio havas signifon ankaŭ por ni nune.

La unua estas ”fremdulo”. Greke estas *xenos* (ξενος). Tio estas la fremdulo, sed la fremdulo akceptita, tiu kiu vivas inter ni. Hungare estas *jővenény*, kiu estas la lasta, la laste alveninta, la fremdulo. Tiu fremdulo vivas inter ni, meze de ni, sed tamen ne estas agnoskata kiel indiĝeno.

La dua estas “pasloĝanto”, kiu estas provizore loĝanta en la urbo. Greke estas *pasoikos* (πασοικος), t.e. najbaro, fremdulo, homo el ekster la civito, kaj

ankaŭ kultivisto sen bieno aŭ tag-laboristo. Kaj tiun signifon portas ankaŭ la hungara *zsellér*, ŝajne malofta vorto.

La tria estas “samregnanoj kun la sanktuloj”. Greke *sunpolitai tōn agiōn* (συμπολιται τῶν ἀγίων), t.e. kunurbanoj, kuncivitanoj de la sanktuloj. Same hungare *polgártársai a szenteknek*, kiel ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

La kvara estas tamen pli interesa, kaj povas korekti eblajn miskomprenojn. Temas pri “el la domanaro de Dio”. Greke estas *oikeios* (οικειος). Ĝia signifo estas domservisto aŭ parenco aŭ intimo. Same la hungara traduko *cseléd* estas domservisto. Tio ne ekzakte rilatas al la ofta kompreno de la teksto : “Vi estas familianoj de Dio”.

Kompreneble, tiu ideo de membroj de la familio de Kristo, do de Dio troviĝas aliloke (Luko 8:21 *Mia patrino kaj miaj fratoj estas tiuj, kiuj aŭdas la vorton de Dio, kaj ĝin plenumas.* aŭ Efesanoj 1:5 *antaŭdestininte nin por filadopto per Jesuo Kristo al Si mem*), sed ne ĉi tie. La apostolo parolas pri io alia. Ĝi diras ke por la kredantoj, por la Eklezio, ne plu estas fremduloj, nek pasantoj, sed kuncivitanoj kaj domaranoj.

Kion diri do antaŭ tiuj du versikloj ? Unue, ke ili estas simple du versikloj kaj ne la tuta Biblio, sed tamen kompreni ilin postulas agordon kun la tuta Skribo. La Biblio estas ĝia propra interpretisto.

Kion diri do ?

Ni ne estas de la mondo, sed estas en la mondo. La mondo ne estas nia batalo. La homoj kaj regnoj ne estas nia respondeco. Ni scias ke ĉio estas en la manoj de Dio. Pro tio ni povas preĝi por

la aŭtoritatoj. Ni ankaŭ povas averti kiel faris la profetoj. Sed reganto ne regu sub la preteksto esti mem la mano de Dio.

Nia civitaneco ne estas en tiu pasanta civito, sed en la alia mondo-tempo, en la domaro de Dio kiu venas, kiun ni atendas kaj esperas, esperas kaj atendas.

Ĉi tie, ĉio pasas, nenio restas por ĉiam, krom la amo, la amo de Dio.

Ĉar ni havas tiun fidon, ni povas serĉadi la civiton kiu venas, la Regno de Dio.

Kaj en ĉi tiu serĉado, en ĉi tiu servado, ni ĉiuj estas kunvokitaj, kuncivitanoj, kunlaborantoj.

Kaj ĉi tiun komunecon, ĉi tiun komunumon, ĉi tiun komunion ni celebras per Sankta Manĝo, kiel antaŭgusto de la restanta venonta civito, kiel antaŭgusto de la Regno de Dio.

Amen.

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2023

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2024
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) *Ĉi-jare finiĝas la deĵor-periodoj de Samuel Gaillard kaj Siegfried Krüger. Ambaŭ estas reelekteblaj.*

(13) *Propono pri la KELI-kongreso 2024: ...*

Financa raporto de KELI 2022

(ĉiuj sumoj en EUR)

Bilancoj fine de la jaroj 2021 2022

Aktivoj

Stoko de libroj	4.925,03	4.925,03
Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	116,00
<i>Provizo</i>	<u>5.041,03</u>	<u>5.041,03</u>

Kasista kaso	570,00	1.020,00
Sekretaria kaso	1.379,00	1.024,00
UEA-konto kelk-p	1.726,64	4.380,14
Ĝir-konto, CIC-banko	3.566,33	1.757,58
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>42.847,33</u>	<u>40.889,08</u>
<i>Monrimedoj</i>	<u>50.089,30</u>	<u>49.070,80</u>

Sumo de aktivoj **55.130,33** **54.111,83**

Pasivoj

Kapitalo	32.554,12	31.373,18
Rezulto de la jaro	-1.180,94	-553,50
<i>Kapitalo entute</i>	<u>31.373,18</u>	<u>30.819,68</u>

Dumvivaj membroj	1.532,50	1.414,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	1.020,08	560,08
Kongresa rezerva kaso	823,48	403,48
Literatura/Himnara kaso	<u>12.903,58</u>	<u>12.903,58</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<u>23.174,15</u>	<u>22.176,15</u>

Kreditoroj	0,00	0,00
Evidente	573,00	1.086,00
KELI-abonoj de EK	10,00	30,00
Kongresaj kotizoj	0,00	0,00
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>583,00</u>	<u>1.116,00</u>

Sumo de pasivoj **55.130,33** **54.111,83**

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2022.12.31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2022 ne ŝanĝiĝis la Stokoj de libroj aŭ kasedoj.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU, kutime kun malalta sumo.
Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický, CZ, kiu zorgas pri la presado kaj
dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe la franca CIC banko (ĝir- kaj
ŝpar-konto).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj.

La rezulto de la jaro 2022 estis bedaŭrinde negativa: - 553,50 eŭroj.

Fondusoj

Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj
Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj.

Laŭ la decido de la estraro Helpa kaso kaj Kongresa rezerva kaso apogis
nian kongreson en 2022

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2022 ni havis kongreson (en Domaszék, Hungario), kaj dum
la kongreso ni kolektis monon al la fonduso *Stichting Zienderogen*
(antaŭa Evidente). Ankaŭ sendis KELI-anoj tiucele monon al la
bankkontoj. La sumon kiel kutime ni ĝiris al la fonduso helpi tiun
laboron, kiun komencis Jacques Tuinder NL.

Same la abonkotizo de Espero Katolika jam estas ĝirita al IKUE

Rezulto 2022 kaj buĝetoj 2022, 2023 kaj 2024 (ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2022	Rezulto 2022	Buĝeto 2023	Buĝeto 2024
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.000	2.306,47	2.200	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	3,65	0	0
Adopta Kaso	300	792,39	350	300
<i>Kotizoj entute</i>	<u>2.300</u>	<u>3.102,51</u>	<u>2.550</u>	<u>2.300</u>
Librovendado	100	18,00	50	100
Rentumoj	25	41,75	25	25
Profito el kongreso	200	0,00	0	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>325</u>	<u>59,75</u>	<u>75</u>	<u>325</u>
Enspezoj entute	2.625	3.162,26	2.625	2.625
Elspezoj				
Presisto + sendado de DR	2.600	2.405,00	2.600	2.600
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2.600</u>	<u>2.405,00</u>	<u>2.600</u>	<u>2.600</u>
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	20	20,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>260</u>	<u>260,00</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
UEA-kotizo	65	44,00	65	65
Bankkostoj	65	76,76	65	65
Merituloj	50	0,00	50	50
UK Lukostoj	50	0,00	50	50
<i>Generalaj kostoj</i>	<u>230</u>	<u>120,76</u>	<u>230</u>	<u>230</u>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Malprofito de la kongreso		930,00		
Rabatoj de perantoj	5	0,00	5	5
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>25</u>	<u>930,00</u>	<u>25</u>	<u>25</u>
Elspezoj entute	3.115	3.715,76	3.115	3.115
Saldoj	-490	-553,50	-490	-490

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2022 kaj la Buĝetoj 2023/2024

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2022 estis pli altaj ol planitaj, ĉar estis membroj, kiuj pagis dujaran kotizon.

Ankaŭ al la Adopta kaso alvenis pli multaj mondonacoj ol ni antaŭvidis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui “laŭforte”.

Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj

Aliaj enspezoj

Librovendado estis malpli, kaj la rentumoj estis pli altaj, ol ni planis, aliaj enspezoj ne okazis.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2022 ni per la kutima simbola sumo dankis la laboron al nia prezidanto, sekretario, redaktoro kaj kasisto.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2022 estis la UEA-kotizoj kaj la Bankkostoj.

Aliaj elspezoj

Nia kongreso en Domaszék, Hungario estis enhavriĉa kaj interesa, sed bedaŭrinde malpli da partoprenantoj povis veni, ol ni planis. Ankaŭ la inflacio estis surprizige alta en Hungario, kaj pro tiuj kaŭzoj nia ĉijara kunestado estis malprofita.

Saldoj

La saldo de la jaro 2022 estis bedaŭrinde negativa: -553,50 eŭroj, sed ni origine kalkulis preskaŭ tiele, ĉar la enspezoj estis iom pli altaj, kaj la elspezoj pro la malprofito de la kongreso estis pli altaj ol ni planis.

Espereble baldaŭ finiĝos la sekvoj de la monda pandemio, kaj aliĝos ankaŭ novaj membroj al KELI. Tiel la sekvontaj jaroj estos ekonomie pli bonaj. La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2023 kaj 2024 tamen enhavas negativan rezulton. Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon.

Somermeza nokto

Uzante vikipediajn paĝojn, redaktis

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

La nokto inter la 23a kaj la 24a de junio nomiĝas *Nokto de Sankta Johano*, ankaŭ konata kiel *Somermeza nokto*. Historiistoj konsideras ĝin unu el plej paganaj festotagoj, sed hodiaŭ ĝi rilatas al la eklezia tago de Johano la Baptisto kaj la naskiĝtago de Sankta Johano (la Baptisto). Somermeza vespero estas apartigita je 3 tagoj de la somera solstico, ĉar ĝi okazas la 21an de junio en la norda hemisfero. Antaŭe, la komenco de la astronomia somero fakte okazis la 24an de junio, sed pro la propreco de la tropika tempokalkula metodo kaj antaŭaj kalendaraj reformoj, la du festoj estis apartigitaj.

La solstico rilatas al sekularaj kaj ekleziaj festoj tra la mondo, ĉar ĝi estas la plej mallonga nokto de la jaro kaj por homoj, la alterno de lumo kaj mallumo havis magian originon. Mallumo signifis forpason kaj lumo signifis renovigon, do en ĉi tiu tago homoj faris grandajn fajrojn por forpeli la mallumon; ĉi tie ankaŭ komenciĝas la astronomia somero.

Ekde la 5a jc oni mencias la komunan feston de la nokto de Sankta Johano kun la festo de Johano la Baptisto, kaj la eklezio metis la daton de naskiĝo de la sanktulo en ĉi tiun tagon, kiel la venko de lumo kaj brilo super mallumo kaj morto.

Tiu ĉi tago ankaŭ nomiĝas somermezo, malsamajn nomojn ĝi ricevis en diversaj landoj laŭ tio, ĉu ĝi estis ligita al somermezo aŭ al Sankta Johano.

En la pagana mondo, ĉi tiu festo havis grandan signifon, la somermeza ĝojfajro simbolis purigon kaj renaskiĝon. Popolaj kutimoj rilataj al ĉi tiu tago, la fajro, inkluzivis, ekzemple, fajrigi grandegajn ĝojfajrojn nokte, danci ĉirkaŭ ili, ĉirkaŭiri la kampojn per brulantaj arbobranĉoj en la espero de abundega rikolto estonte aŭ ruli flamantan radon laŭ la montetoj.

La plej fama verko rilata al Sankta Somermeza Nokto estas la komedio *Somermeznokta sonĝo*, de William Shakespeare en 1595, kaj la verko de Felix Mendelssohn, kies sepa parto estas la bonkonata melodio, kiun oni ludas je nuptaj festoj. ☾



17a jarcento Sankta Johano-festadoj ĉe la Piazza della Signoria, Florenco. Nekonata majstro

Pensoj pri la Esenco

Eseoj de Tetyana Lohvinovska

La eseojn tradukis Oldřich FISCHER, CZ

Dankon, Tanja! Ni renkontiĝis hazarde sur Via retpaĝo.

Al mi plaĉis kelkaj Viaj poemoj kaj lernis de Vi rusan lingvon, ĉar mi laboris en Ŝtata Bestkuracista Administraro de Ĉeĥa Respubliko kaj ĉeĥigis ruslingvajn bestkuracistajn dokumentojn.

De tempo al tempo mi devis traduki ankaŭ bestkuracistajn dokumentojn en ukraina lingvo kaj eksciis, ke ukraina kaj ĉeĥa lingvoj estas tre similaj.

Kiam soldataĉaro, kiun sendis freneza diktatoro, insideme atakis Vian patrujon, ni ekkorespondis pli ofte.

Al mi ne plaĉis skribi al Vi en lingvo de niaj komunaj malamikoj kaj petis Vin uzi ukrainan lingvon.

Kaj baldaŭ mi volis esperantigi iun Vian tekston.

Tuta mondo devas scii, ke ukrainoj havas talentitajn aŭtorojn!

Kiu volas labori, tiu ĉiam serĉas novajn vojojn.

Ja eĉ dum milito oni povas eldoni novajn librojn, ekzemple eksterlande.

Esperantigante Viajn eseojn, mi multe ellernis. Ne nur lingvojn, sed ankaŭ multe por mia vivo. Mi admiras Vian saĝecon.

Korespondante ukraine ni bele kunlaboris komprenante unu la alian.

Por mi Vi estas simbolo de fiera Ukrainio, kiu ne kliniĝis antaŭ kruela malamiko. Ankaŭ vorto estas armilo.

Eldono de Viaj eseoj en Brno estas mia helpo al batalanta ukraina popolo kaj vangofrapo al senskrupula uzurpanto.

Dankon al Vi, kara Tanja!

Mi antaŭĝojas nian venontan kunlaboron.

Gloro al Ukrainio! Gloro al herooj!

Brno en februaro 2023
Via moravia amiko Olda



Al Di', gefratoj

NEHMT ABSCHIED, BRÜDER



1. Al Di', ge-fra-toj! Ĉu re-ven'? Aŭ ĉu por ĉi-am for?



Es-tont' sin ka-ŝas en mal-lum'. Pe - zi-ĝas ni-a kor'.

refreno:



Ĉi - el' sin vol-bas su-per ni. A - di-aŭ! Ĝis re - vid'!



Ni ku-ŝas en la man' de Di'. Bon - far-tu! Ĝis re-vid'!

2. Subiris sun', sin levis lun', / ekdormis nia land'.
El nokt-silent' aŭdiĝas nun / la najtingala kant'.
3. En ver': En ĉiu komenciĝ' / proksimas jam la fin'.
Ni venas, iras. Nia temp' / kun ni konsumas sin.
4. La viv', gefratoj, estas lud'. / Ni ĝuste ludu ĝin,
por ke la grandan celon ni / atingu, vidu Lin.

NEHMT ABSCHIED, BRÜDER • M: el Skotlando, unu el multaj versioj • germana T: Claus Ludwig Laue 1946, versio el Wikipedia, © Deutsche Pfadfinderschaft Sankt Georg • E: Kloster Kirchberg 2023-03-15

Al Di' estas la laŭvorta klarigo de Adiaŭ, kp. france kaj germane: Adieu, itale: Addio, hispane: Adiós, portugale: Adeus.